

**Aulo MINELL**

**BELARTA  
VORTARO**

Versio 1.0 15-02-2012  
Prilaborita de Robert  
BOGENSCHNEIDER 10-2017

## Zamenhof pri la vortaroj

... Ĉe la kreado de detalaj teĥnikaj vortaroj la specialistoj devas sin gvidi je tiuj samaj reguloj, laŭ kiuj oni kreas ilin en ĉiuj lingvoj, t.e.:

1) Antaŭ ĉio oni demandas sin, ĉu tia vorto ne ekzistas jam en la komuna lingvo; ekzemple, se velocipedisto bezonas la vorton "rado", li kompreneble ne kreos novan vorton, sed prenos la vorton ekzistantan jam en la komuna vortaro.

2) Se oni scias, ke la bezonata vorto ankoraŭ ne ekzistas, t.e. simple ne estis ankoraŭ uzata, oni penas krei la vorton el la aliaj radikaj vortoj, kiuj jam ekzistas en la lingvo. Ekzemple, se en ia juna lingvo la unuan fojon devas aperi matematika verko, la verkanto, bezonante esprimi ekzemple "multobligi", "dividato" aŭ "triangulo", kreos tiujn vortojn facile el la vortoj jam ekzistantaj en la vortaro.

3) Se, fine, la vorto ne ekzistas en la komuna vortaro kaj krei ĝin el la ekzistantaj vortoj estas malfacile aŭ donas esprimon nekularan, tro longan kaj ne oportunan, la specialisto, ne longe pensante kaj ne ĝenante sin, simple prenas la vorton el ia alia lingvo, donante al ĝi nur la ortografion de lia lingvo. La elekto ordinare ne estas malfacila, ĉar la plej granda parto da vortoj de tiu ĉi 3-a kategorio estas egale uzataj (kiel vortoj "fremdaj") en ĉiuj lingvoj kaj estas sekve jam per si mem internaciaj. Se vi dubas, ĉu la bezonata vorto estas uzata en ĉiuj lingvoj egale aŭ malegale, vi povas simple preni la vorton el la vortaro franca (kiun ĉiu povas ja facile havi), aŭ helpi al vi en ia alia maniero, tiel same, kiel en ĉiu juna lingvo helpas al si la kreantoj de novaj specialaj vortoj ne turnante ja sin al ia beletristo aŭ filologo...

Lingvo Internacia, 1896, p. 102-103.

... La ĉefaj principoj de la vortuzo en Esperanto estas la sekvaj:

a) Ĉiu vorto, kiu troviĝas en la Universala Vortaro estas leĝdona por ĉiuj esperantistoj, kaj neniu en la mondo, nek la aŭtoro de Esperanto nek ia alia esperantisto havas la rajton fari en tiuj vortoj ian ŝanĝon (se ekzemple anstataŭ "ŝipo" iu uzas la vorton "navo", ĉar la vorto "ŝipo" al li "ne plaĉas" - tio estus rekta peko kontraŭ la unueco de nia lingvo kaj ĉiuj esperantistoj tiam protestus).

b) Se vorto per si mem estas internacia, tiam laŭ la regulo 15 de nia gramatiko ĉiu havas la rajton uzi tiun ĉi vorton, kvankam ĝi ne troviĝas en la Universala Vortaro. (Ekzemple neniu povus protesti kontraŭ la uzado de la vortoj "aŭtoro", "telegrafo" k.t.p., kvankam ili ne troviĝas en la Universala Vortaro.)

c) Sed se ia vorto nek estas sendube internacia nek havas por si apartan radikon en la Universala Vortaro kaj esprimi ĝin per kunmeto de radikoj jam ekzistantaj estas aŭ tute ne eble, aŭ tro neoportune, aŭ teknike ne precize, - tiam tiun ĉi vorton ĉiu aŭtoro povas mem krei laŭ sia bontrovo, tiel same kiel oni ĝin faras en ĉiu alia lingvo. Tiu ĉi permeso estas necesa, ĉar alie la lingvo estus tro rigida kaj multajn ideojn oni tute ne povus esprimi en ĝi. Sed ĉar ne ĉiuj personoj povas mem krei al si vortojn kaj ĉar estas dezirinde, ke ĉiuj uzu la novajn vortojn kiom eble egale, tial ĉiu nove aperanta vortaro ordinare enhavas en si kelkan nombron da novaj vortoj sub la kontrolo...

Lingvo Internacia, 1904, p. 336-338.

## Mallongigoj

Ci Cinabroruĝo  
Fe Fero  
Ka Kalko  
Kf Kadmioflavo  
Kr Kadmioruĝo  
Kro Kromoflavo  
Li Litopono  
Mb Montobluo  
Mv Montoverdo  
Pb Plumboblanko  
Pm Plumbominio  
Pr Prusbluo  
Ul Ultramarbluo  
Zi Zinko  
Zs Zinkosulfuro

An La angla  
Fi La finna  
Fr La franca  
Ge La germana  
It La itala  
Sv La sveda

a. Eblas miksi kun akvaĵoj  
k. Eblas miksi kun alkaloj  
l. Toleras lumon  
o. Eblas miksi kun oleoj  
s. Toleras sulfurhidrogenon  
v. Toleras varmon (200 0C)

XX Venenega  
X Venena  
x Dubinda  
Kp Komparu:  
V.p Vidu la paĝon

d diafana  
dd duondiafana  
dn duonnediafana  
n nediafana

akr Akrilfarbo  
akv Akvarelfarbo  
gua Guaŝfarbo  
ole Olefarbo  
paŝ Paŝtelo

Ar La araba  
Gr La greka  
Hi La hispana  
La La latina  
Ne La nederlanda  
Po La portugala

be Becker  
gu Guitar  
ma Maimeri  
ro Rowney  
ta Talens  
wi Winton

**P** Preferinda  
**H** Hezittaksinda  
**E** Evitinda

## Belartoeroj:

af\* Artfako  
as\* Artoskolo  
ec\* Eco  
fa\* Faraĵo  
fb\* Farbo  
fm\* Farbmateriale  
il\* Ilo  
kl\* Koloro  
kn\* Kolornuanco  
ku\* Kulturo  
ma\* Maniero  
mt\* Materio  
ob\* Objekto  
re\* Regulo  
si\* Signo  
sl\* Stilo  
st\* Strukturo  
su\* Suspensiaĵo  
te\* Tekniko  
ti\* Tipo

## Lumtoleremo:

ro: (Min.)  
\*\*\*\*\* Bonega (3 jc.)  
\*\*\*\* Bona (1,5 jc.)  
\*\*\* Kontentiga (75 jd.)  
\*\* Nebona (40 jd.)  
\* Malbona (25 jd.)

ta: wi: (Min.)  
\*\*\*\*\* Bonega (3 jc.)  
\*\*\*\* Bona (1,5 jc.)  
\*\*\* Kontentiga 75 jd.)  
\*\* Nebona (40 jd.)  
\* Malbona (25 jd.)

## Klarigo de signoj

0 VIOLA = -566 400 mμ	12½ NAPOLOFLAVA = 576 mμ	A BLANKA
½ KAMPANULVIOLA = 426 mμ	13 ORANĜAFLAVA = 581 mμ	B BLANKETA
1 BLUVIOLA = 440 mμ	13½ OKSIDOFLAVA = 585 mμ	C BLANKAGRIZA
1½ MINERALBLUA = 452 mμ	14 ORANĜA = 590 mμ	Ĉ GRIZETA
2 VIOLBLUA = 460 mμ	14½ SIENTERORANĜA = 595 mμ	D GRIZA
2½ CENTAŬREBLUA = 465 mμ	15 ORANĜARUĜA = 601 mμ	E GRIZEGA
3 ULTRAMARA = 469 mμ	15½ CINABRORUĜA = 607 mμ	F NIGRAGRIZA
3½ LAZURBLUA = 472 mμ	16 RUĜA = 614 mμ	G NIGRETA
4 BLUA = 475 mμ	16½ KARMINRUĜA = 630 mμ	Ĝ NIGRA
4½ ĈIELBLUA = 478 mμ	17 PURPURARUĜA =	10 TUTKOLORA
5 TURKIZA = 482 mμ	-495 mμ 700 mμ	09 TRE KOLOREGA
5½ MARBLUA = 487 mμ	17½ RUĜBETRUĜA = -510 mμ	08 KOLOREGA
6 VERDABLUA = 493 mμ	18 PURPURA = -526 mμ	07 KOLOREGETA
6½ MIRTVERDA = 500 mμ	18½ LILA = -542 mμ	06 KOLORA
7 BLUVERDA = 511 mμ	19 PURPURVIOLA = -557 mμ	05 MEZKOLORA
7½ KROMOVERDA = 527 mμ	19½ HELIOTROPVIOLA =	04 MEZKOLORETA
8 VERDA = 544 mμ	-564 mμ	03 IOM KOLORA
8½ KROMOOKSIDVERDA =	0 VIOLA = -566 400 mμ	02 KOLORETA
554 mμ		01 IOM KOLORETA
9 BRILANTVERDA = 560 mμ		00 SENKOLORA
9½ FILIKVERDA = 564 mμ		
10 FLAVERDA = 568 mμ		
10½ LAKTUKVERDA = 570 mμ		
11 VERDAFLAVA = 571 mμ		
11½ MIMOZFLAVA = 572 mμ		
12 FLAVA = 573 mμ		

## Antaŭparolo

Ĝenerale oni demandas al kolektanto de vortaro, kiamaniere vi inventas la vortojn? Estas ja malprave supozoj, ke la vortaristo inventas la vortojn, tute ne, nur Zamenhof meritas la respekton ĉi-rilate. Verdire, estas tiel, ke la vortoj jam ekzistas iamaniere, aŭ ekzistas en la komuna lingvo aŭ oni kreas el la aliaj radikaj vortoj aŭ oni prenas la vortojn el iu alia lingvo - precipe fruktodona estas la franca, kiu ĝis nun funkcias kiel lingvo de belartistoj.

La plej granda problemo estas elekti konvenajn vortojn el tro vasta vortostoko tiel, ke la vortoj plenumas la postulojn de Esperanto - fonetiko, gramatiko, historio, internacia kulturo, kolizio kun jam ekzistantaj esprimoj, ortografio, strukturo ktp.

Vortoj por BELARTA VORTARO havas signifon de sociscienca temo, precipe interne de la Esperanto-komunumo. Des pli, ĉar ĝi estas vere malmulte plugita kampo de la komunumo.

Ĉefprincipe oni klopodu trovi kohercon kaj tendencas ĝin krei tiel, ke oni taksas neceson kaj sufiĉon. Oni evitu pseŭdosufiksojn, se tiu donas plibonan resulton. Pri la vortoj kun pseŭdosufiksoj respondas ZAMENHOF en Oficiala Gazeto 1911 sekve: "...Ni povas esperi, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj "fremdaj" fariĝos arĥajismoj [arkaismoj] kaj cedos sian lokon al vortoj "pure Esperantaj"; ni povas eĉ konsili tion; sed postuli tion ni ne povas,... ..sed ŝajnas al mi, ke estas multe pli bone havi en la unua tempo ian "embarason de riĉeco", ol malutili al si per ia ne sufiĉe matura dekreto, elĵetante el la lingvo vortojn, kies elĵetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa..."

En la vortaro oni uzas simplan kaj elementecan lingvaĵon en la interpretoj, por ke la leganto ne devas studi la nekonatajn vortojn, pere de nekonataj vortoj.

En la paĝoj 4 kaj 5 estas la ĉefprincipoj pri la vortaroj laŭ Zamenhof.

En la paĝo 6 oni vidas la mallongigojn pri

- naturaĵaj farbmaterialoj por fari farbojn - Ci, Fe, Ka, Kf, Kr, Kro, Li, Mb, Mv, Pb, Pm, Pr, Ul, Zi, Zs - kaj en la klarigaj tekstoj konsiloj pri la intermiksecoj.
- diafaneco - d, dd, dn, n.
- suspensiaĵo - akr, akv, gua, ole, paŝ.
- mikseco kaj toleremo - a. k. l. o. s. v.
- veneneco kaj atentigoj - XX, X, x, Kp, V.p.
- preferendeco - **P, H, E**.
- lumtoleremo - \*\*\*\*\* , \*\*\*\* , \*\*\* , \*\* , \* , .
- belartoeroj - **af\*** = branĉo, ĉelo, ekspertizisto, fako, kompetentulo, personfako, sekcio, spertulo, - isto, -ado, -aĵo, -verko ; **as\*** = personskolo, skolo, -ismo, -isto, -aĵo, -verko ; **ec\*** = karakteriza, specifa, spirita aŭ materia kvalito aŭ stato, -a, -eska, -oida ; **fa\*** = aranĝitaĵo, io farita, kadro, kreaĵo, preta pentrotolo, produktaĵo, reformaĵo, serva agaĵo, -o, -aĵo, -verko ; **fb\*** = koloraĵo, kolorigilo, akril-, akvo-, akvarel-, guaŝ-, oleofarboj kaj paŝtelo, -o ; **fm\*** = kolorilo por farbo, kolorpulvoro por farbo, pigmento, pulvorigita kolorilo, -o ; **il\*** = aparato, ilaro de artisto, instrumento, laborilo, -o, -ator- ; **kl\*** = kolorefekto, kolorteorio, -a ; **kn\*** = delikata diferenco inter koloroj, populara kolornomo, -a ; **ku\*** = civilizado, klerigo, laborejo, lernejo, loko, muzeo, tempo, -o, -ejo ; **ma\*** = ilustrato, kunmet-, labor-, ornam-, planmaniero, -e, -o ; **mt\*** = kemio, ligno, malo al energio, materialo, metalo, stono, tolo, -o ; **ob\*** = aĵo, afero, artobjekto, besto, domo, homo, kreskaĵo, motivo, temo, -o ; **re\*** = artregulo, homogena aŭ simetrio, klarigo, normo, ordo, ornombro, regulo por harmonio, -o, -a, -e, -i, -u ; **si\*** = ekslibriso, insigno, marko, nobelblazono, signalo, signaturo, simbolo ; **sl\*** = artostilo, dekstra- aŭ maldekstramanulo, karaktero, persona maniero, skribkaraktero, -o, -a, -e, -aĵa, -eca ; **st\*** = sistemo, strukturo de artaĵo aŭ modelo, -o, -a ; **su\*** = akrilo, akvo, alkoholo, diluilo, emulsio, emulsioideo, fluaĵo, fluidaĵo, kazeino, koloido, lako, latekso, likvaĵo, maldensigilo, malviskozilo, oleo, parafino, solvilo, -o ; **te\*** = efektivigo, fartalento, labormetodo, manlaboro, metodo, movado, sperteco, -o, -e, -igo ; **ti\*** = efekto, enhavo, impreso, karaktero, mieno, modelo, ornamo, ornamtipo, pra- aŭ prototipo, preslitero, speco, specio, -o, -e, -aĵo, -igo.
- fabrikoj - be, gu, ma, ro, ta, wi.
- diversaj lingvoj - An, Ar, Fi, Fr, Ge, Gr, Hi, It, La, Ne, Po, Sv.

En la paĝo 7 oni vidas klarigojn pri koloroj pere de la

- kolorcirklo kun 20 ĉefkoloroj [mia inventaĵo] - de 0 ĝis 19.
- nuanctableto kun 82 kolorefikoj kaj 9 grizefikoj - A, B, C, Ĉ, D, E, F, G, Ĝ.
- 40 kolornomoj kun la ondolongo, grizgradoj - A, B, C, Ĉ, D, E, F, G, Ĝ - kaj kolorkvantoj - 01, 02, 03, 04, 05, 06, 07, 08, 09, 10.

Krome mi planis helpilojn por reguli la laboron, nome:

- privilegion por la klarigoj [20] kaj tableton [24 eroj].
- ekzemplaron kaj klarigaron pri la belartoeroj [20].
- katalogon kun la kurtaĵoj pri la bild- kaj tekstofontoj [23].
- konsiloj por egaligi la lingvaĵon.

Aulo MINELL



**ABAK/O HELENA**

Tipo.

Kvarangula plato inter la ĉeftrabo kaj la supro de la kolono. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ABELVAKS/O**

Suspensiaĵo.

Ĝi estas la sola vakso kiun oni povas uzi por pentrado. La vakson eblas utiligi kaj ne-prilaborite kaj blankigite. La fandovarmo estas +62 °C kaj en la stato, solveblas kun terebinto kaj sekiĝema oleo. Ĝin eblas miksi kun kolor-materialo kaj kiel emulsio kaj kiel solvaĵo kun kaj terebinto kaj oleo. Miksaĵon de terebinto kaj vakso eblas ŝmiri sur pretan pentraĵon. La vakson eblas miksi ĝis 2% kun oleofarbo, ne pli. Vidu: Vakso.

**ABELVAKSOBLANK/A**

Kolornuanco.

12B04.

FLAVA-

BLANKETA-

MEZKOLORETA An: Wax white; Fi: Vahanvalkoinen; Fr: Blanc cire; Sv: Vaxvitt. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Vaksablanka. Kp: kl\*.

**ABELVAKSOFLAV/A**

Kolornuanco.

12½B06. NAPOLOFLAVA-BLANKETA-KOLORA. An: Wax yellow; Fi: Vahankeltainen; Fr: Jaune cire; Sv: Vaxgult. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Vaksoflava. Kp: kl\*.

**ABOCOART/ISMO**

Artoskolo.

Ĉe svisaj konstruktivistoj ĉ. en la j. 1924. La grupon estris rusdevena El Lissitzky. Vidu: Konstruktivismo. Kp: af\*.

-/ISTO Ano. -/AĴO Artaĵo.

**ABOCOLERN/EJO**

Kulturo.

Desegnernejo École A.B.C. de Dessin en Parizo.

**ABRIKOTFLAV/A**

Kolornuanco.

13½B07. OKSIDOFLAVA-BLANKETA-KOLOREGETA. [Prunus armeniaca] An: Apricot yellow; Ar: Al-burquq; Fi: Aprikoosinkeltainen; Fr: Abricot, Jaune abricot; Po: Albricoque; Sv: Aprikosfärgat. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**ABSINTOFLAV/A**

Kolornuanco.

12½Ĉ06. NAPOLOFLAVA-GRIZETA-KOLORA. An: Absinthe yellow; Fi: Absintinkeltainen; Fr: Jau-

ne absinthe; Sv: Absintgul. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*

**ABSINTVERD/A**

Kolornuanco.

10D06. FLAVAVERDA-GRIZA-KOLORA.

[Artemisia absinthium] An: Absinthe green; Fi: Absintinvihreä; Fr: Absinthe, Vert absinthe; Gr: Apsinthion; Sv: Absintgrön. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**ABSOLUTART/ISMO**

Artoskolo.

Konsideras kaj taksas nur estetikajn ecojn kaj faktorojn, kaj ignoras similecon, ideologian enhavon kaj taŭgecon, kaj ne nomas artaĵojn laŭ la temo kaj la etoso. Ĝi taksas nur formecon kaj konstruitecon kun facoj, koloroj kaj masoj. Kp: af\*.

-/ISTO Ano. -/AĴO Artaĵo.

**ABSOLUTFUNKCIONAL/ISMO**

As\*.

Kiu en arkitekturo kaj aliaj artoj substrekis uzon de konstruaĵo aŭ objekto por formdesegnado ĝis la absoluteco. Simpleco kaj racieco regis la formdesegnadon. Ĝi aktualis inter la unua kaj la dua mondmilito. Kp: af\*.

-/ISTO Ano. -/AĴO Artaĵo.

**ABSTRAKT/ISMO**

Artoskolo.

En pentroarto, skulptoarto kaj artgrafiko, kiu ne celas prezenti realajn formojn kaj kolorojn, sed nur purajn ecojn laŭ la imago de la artisto. Kp: af\*.

-/ISTO Ano. -/AĴO Artaĵo.

La skolanjoj: AFRO, ARP, BAUMEISTER, BAZAINE, BEAUDIN, BILL, BODMER, BORÈS, BRANCUSI, CALDER, DELAUNAY, DEWASNE, DEYROLLE, DOESBURG, DUCHAMP, ERNST, ESTÈVE, GABO, GIACOMETTI, GONĈAROVA, HARTUNG, H, HARTUNG, K, HEPWORTH, KANDINSKY, KLEE, KUPKA, LAUGIER, LE CORBUSIER, LIPCHITZ, LOHSE, MAGNELLI, MALEVIĈ, MANESSIER, MASSON, MATHIEU, MIRÓ, MOHOLY-NAGY, MONDRIAN, MOORE, NAY, NICHOLSON, OZENFANT, PICABIA, PIGNON, PILLET, POLIAKOFF, SANTOMASO, SINGIER, SOLDATI, TANGUY, UHLMAN, VANTONGERLOO, WERNER, WINTER.

**ABSTRAKTA EKSPRESION/ISMO** Artoskolo.

En pentroarto, kiu substrekas prezentadon de la interna propra vizio kaj sentmanieron de la artisto laŭ abstrakta maniero. Kp: af\*.

**-/ISTO** Ano. **-/AĴO** Artajo.

**ABSURDART/ISMO** Artoskolo.

Kiun karakterizas: kaj ne racia, ne laŭ la reguloj de la logiko, kaj kontraŭa al la aprobata saĝo. Kp: af\*.

**-/ISTO** Ano. **-/AĴO** Artajo.

**ACIDBAN/O** Ilo.

Laborilo por acidtrakti zinkoplaton en grafikado.

**ADAMSTILA MEBL/O** Tipo.  
**NOVKLASIKA**

Angla meblo- kaj aranĝostilo, kiu heredis la nomon el la artmeblistoj Robert kaj James Adam.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ADULARI/O** Materio.

Hela, diafaneta specio de ortoklazo, kiun oni uzas kiel gemon. Troviĝanta precipe en Alpoj.

**AEROPIKTUR/O** Artfako.

Itala branĉo de Futurartismo, kiu celas prezenti flugefekton. Benedetta Marinetti publikigis en la jaro 1929 la programon je nomo "Manifeste de 'l aéropeinture". Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/AĴO** Produkto.

**AFIŜART/O** Artfako.

Ĝi estas balota, reklama, teatra sciigilo sur papero, kiun oni pretigas cele kun arteca efekto. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/AĴO** Produkto.

**AGAT/O** Materio.

Amorfa speco de kalcedono, demetiĝinta en geodojn laŭ paralelaj tavoloj, prezentanta variajn, ordinare diafanajn koloraĵojn kaj briliĝanta per polurado. Ĝin oni uzas por fari ornamaĵojn kaj brilaĵojn, intajlojn kaj kameojn. Laŭ Plinius agaton oni trovis unue en Sicilio en Akhates-rivero.

**AGATBRUN/A** Kolornuanco.

14½E09. **SIENTERORANĜA-GRIZEGA-TRE KOLOREGA** An: Agate; Fi: Agaatinruskea; Fr: Brun agate; Gr: Akhates; Sv: Agatbrunt. V. p-ojn 6 k 7.

Kp: kl\*.

**AGATSIMILAĴ/O** Materio.

Angla fajenco en la 18. jc, kiu similas kun vera agato.

**AGATVITR/O** Materio.

En renesanca Venecio fabrikita agatsimila vitro. Post la jaro 1800 fabrikita ankaŭ en Bohemujo.

**AĴUR/O** Objekto.

Juvelo, kiu estas fiksita je la randoj tiel, ke la fono estas malferma, apertura, travidebla. Aperturo, tajlita aŭ aranĝita en teksaĵo.

**AKADEMI/O** Kulturo.

Grava societo de majstroj, profesoroj, fakuloj. Societo, konstanta kaj oficiala, de literaturoj, artistoj aŭ sciencistoj. Supera lernejo. La plejmalnova kun la regularo estas Accademia di San Lucca en Romo; oni fondis ĝin en la jaro 1577 kaj la regularon en la jaro 1599.

**AKADEMIEC/A** Eco.

Tradicia, konvencia, konservativa; apartenas al ĝenerale aprobata artnocio, teknike lerta, sed konservativa maniero trakti arton.

**AKANTA ORNAMAĴ/O HELENA** Tipo.

Ĝi floris antaŭe kiel dekoracio en Asirio kaj Egiptio, sed la helena havas pli elastajn figurojn, klarajn konturojn kaj fortan stilecon. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AKANTA ORNAMAĴ/O** Tipo.

**ROMANI/A** Estas vere abunda kaj elasteca. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AKRAPINTA PENIK/O** Ilo.

Laborilo por pentrado kaj desegnado.

**AKRIL/O** Suspensiaĵo.

CH<sub>2</sub>:CHC.



**AKROBAT/ARTO** Artfako.

En kiu oni faras lertegajn, gimnastikajn elmon-trojn de ekvilibro aŭ de forto, kun arteca maniero, en cirklo ks. Kp: as\*.

-/O Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO  
Produkto.

**AKROTERA PALMET/O EGIPTA** Tipo.

Estas forme varia, kutima ornamaĵo, kiu origi-nas el palmfolia branĉaro kaj evoluas al la vent-umila formo. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AKROTER/O HELENA** Tipo.

Ĝi estas la nomo de la plejgranda ornamaĵo de la frontono (gablotriangulo). Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AKSOPLAN/O** Tipo.

Simetria kunmetaĵo ambaŭflanke de la meza streko. Vidu: Homa korpo meznombra, re\* k Kapa nombro re\*. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AKTOR/ARTO** Artfako.

En kiu oni ludas rolon teatre, filme ks, kun ar-teca maniero. Kp: As\*.

-/O Praktikanto. -/ADO Ago. -/OROLO  
Produkto.

**AKVAFORT/ARTO** Artfako.

Ĝin oni presas sur papero per kupra plato, kiun oni gravuris per fortakvo, kun arta celo. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/O  
Produkto.

**AKVAMARINBLU/A** Kolornuanco.

5C04. TURKISA-BLANKAGRIZA-MEZ KO-LORETA. An: Aquamarine; Fi: Akvamariininsinen; Fr: Bleu aquamarine; La: Aqua marina; Sv: Akva-marinblätt. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**AKVAREL/ARTO** Artfako.

Ĝin oni pentras per akvosolveblaj farboj sur pa-pero, kun arta celo. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/O  
Produkto.

**AKVATINT/ARTO** Artfako.

Ĝin oni presas sur papero per kupra plato, kiun oni gravuris per rezinsolvajo kaj nitracido, kun arta celo. Pere de la metodo eblas produkti la plej subtilajn griznuancojn, per etetaj nigraj punktoj. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/O  
Produkto.

**AKVOMIKSAĴ/O** Suspensiaĵo.

Kiu formas diverstipajn akvofarbojn, kiel kun gluo, farungluo, gelateno, kazeino kaj amelo, kaj gumo kaj oleo kun emulsiigaĵo - tiel ĝi estas miksaĵo. Ekzemple: diversaj temperoj.

**ALABASTR/O** Materio.

CaSO<sub>4</sub>\*2H<sub>2</sub> O. Diafaneta variaĵo de gipso, similanta marmoron kaj facile polurebla.

Dum antikva epoko oni fabrikis el alabastro lampojn, miniaturartiklojn, murkovraĵojn kaj vazojn. En Okcident-Eŭropo oni akceptis dum la 14. jc.

**ALABASTROBLANK/A** Kolornuanco.

13<sup>1</sup>/<sub>2</sub>B02. OKSIDOFLAVA-BLANKETA-KO-LORETA. An: Alabaster; Fi: Alabasterinvalkoinen; Fr: Blanc alabaster; Gr: Alabastros; La: Alabaster; Sv: Alabaster. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**ALABASTROPAPER/O** Materio.

Diketa papero kies surfaco similas al glaci-kristalaro.

**ALABASTROVITR/O** Materio.

Alabastrosimila vitro el kiu oni fabrikas or-namartiklojn.

**ALCIONBLU/A** Kolornuanco.

5Ĉ09. TURKISA- GRIZETA- TRE KOLORE-GA. [Alcedo atthis] An: Ice blue; Fi: Jäälinnunsinen; Fr: Bleu martin-pogheur; Ge: Eisblau. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**ALEKSANDRIAN/ISMO** Artoskolo.

Rafinita kaj trodelikata arto. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO  
Produkto.

**ALFENID/O** Materio.

Alojo el kupro, zinko, nikelo kun 20% da arĝento.

**ALGRAF/ARTO** Artfako.

En ĝi oni faras bildon sur ebena surfaco de aluminometalo per grasa kreto aŭ -tuĉo. Post kolorigo oni reproduktas la bildon sur papero. Vidu: Litografarto kaj Zinkografarto. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/IO Ago. -/O Produkto.

**ALIZARIN/O** Farbo.

An: Alizarin; Fi: Alitsariini; Fr: Alizarine; Ge: Alizarin; Hi: Alizarina. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ALIZARINBRUN/O** Farbo.

ole: ro\*\*\*, akv: ro\*\*. An: Brown madder, Brown madder alizarin, Madder brown; Fi: Alitsariiniruskea; Fr: Laque de garance brun; Ge: Krapplack braun; Hi: Laca de garanza oscura aliarina. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ALIZARINKARMIN/O** Farbo.

16½...17A ... E08 ... 09. akv, ole: ro\*\*\*, ta, wi. Karminpostiĉo el terkarba kudro, antaŭe vera: ekstraktata el la koĉenilo. An: Alizarin carmine, Alizarin crimson, Crimson, Permanent alizarin crimson; Fi: Alitsariinikarmiini; Fr: Carmoisi d Alizarine; Ge: Alizarinkarmesin; Hi: Carmesí de Alizarina. Vidu: Alizarinruĝo kaj Karminruĝo. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ALIZARINPURPUR/O** Farbo.

akv: ro\*\*\*, ole: ro\*\*. An: Purple lake; Fi: Alitsariinipurppura; Fr: Laque pourpre; Ge: Purpurlack; Hi: Laca purpura. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*

**ALIZARINROZ/O** Farbo.o

le: ro\*\*\*. An: Alizarin rose madder, Rose madder, Rose madder quinacidone; Fi: Alitsariiniruusu; Fr: Garance rose quinacidone; Gr: Krapplack rosa quinacidone; Hi: Rosa de garanza. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ALIZARINROZRUG/O** Farbo.

akv, ole: ro\*\*\*. An: Rose doré, Rose doré alizarin; Fi: Alitsariinirusunpunainen; Fr: Roré alizarine; Gr: Rose

doré alizarin; Hi: Rosa dorado alizarina. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ALIZARINRUG/O** Farbmaterio.

AlCa. 15½A08. 0,606 ... 0,628 µm. a.k.s.v. Norma farbmaterio. Eblas miksi kun Ci, Kf, Kr, Kro, Li, Mb(x), Mv(x), Pb, Pm, Pr(x), Ul, Zi(x), Zs. An: Madder, Madder lake; Fi: Krappilakka; Fr: Laque de garance; Ge: Alizarin-Krapplack, Krapplack, Wurzelkrapplack; It: Lacca di garance, Lacca garanza; Sv: Krapplack. V. p-ojn 6 k 7.

Ĝi postulas 70% da oleo. Sekiĝas nebone. Oni konas ĝin ekde la antikva epoko, kiel naturan substancon, kaj ekde la 1868, kiel artefaritan sub-stancon. Kp: fb\*.

-/A Kolornuanco.

**ALIZARINRUG/O** Farbo.

15½...16½A...G07...09. Ekstraktata el planto [Rubia tinctorum]. La plejkutimaj suspensiaĵoj estas aŭ akrilo aŭ oleo. Rimarku, ke ekde la 1868, kiel artefarita. An: Madder lake; Fi: Alitsariinipunainen. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Alizarinkarmino, Alizarinruĝo postiĉa kaj komparu kun: Alizarinruĝo farbmaterio. Kp: fm\*.

**ALIZARINRUG/O POSTIĈA** Farbo.

16...17B...GO7...08. akv: ro\*\*...\*\*\*, ole: ro\*\*\*. Rimarku, ke kutime oni ne distingas en diverslingvaj nomoj ĉu la farbo estas artefarita aŭ ne. An: Crimson lake, Crimson madder; Fi: Alitsariinipunainen keinotekoinen; Fr: Garance cramoisie, Laque cramoisie; Ge: Karmesinlack; Hi: Laca carmin. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Alizarinkarmino, Alizarinruĝo kaj komparu kun: Alizarinruĝo farbmaterio. Kp: fm\*.

**ALIZARINSKARLAT/O** Farbo.

akv, ole: ro\*\*\*. An: Scarlet lake; Fi: Skarlaatti; Fr: Laque ecarlate; Ge: Scharlachlack; Hi: Laca escarlata. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ALIZARINVERD/O** Farbo.

An: Alizarin green; Fi: Alitsariinivihreä. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ALKOHOL/O** Suspensiaĵo.

Etilalkoholo C<sub>2</sub>H<sub>5</sub>OH. Vaporigema fluaĵo enhavata en diversaj trinkaĵoj. Organika substanco kun OH-grupo. Por pentrado oni ne uzas ĝin

kiel efektivan suspensiaĵon, sed kiel krom-  
kaj purigan substancon.

**ALTAMIRAGROT/O** Kulturo.

Situas en Hispanio en provinco Santander. Famiĝas ekde la jaro 1879, kiam oni trovis la mirindajn grotentraĵojn. La bildoj prezentas ĉasbestojn, alkojn, aprojn, bizonojn kaj prabovojn.

La farbkoloroj estas bruna, nigra kaj okra, kaj ili konis jam ombrigan teknikon. La farajĵoj datumas al la plimaljuna ŝtonepoko. Vidu: Kaverna bizono prahistoria ti\*.

**ALUMINIBLANK/A** Kolornuanco.

13Ĉ01. ORANĜAFLAVA-GRIZETA-IOM KOLORETA. An: Aluminium; Fi: Alumiinivärinen; Fr: Aluminium de couleur; La: Alumen; Sv: Aluminium. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**AMARANTRUĜ/A** Kolornuanco.

18E08. PURPURA-GRIZEGA-KOLOREGA

[Amarantus] An: Amaranth; Fi: Amarantinpunainen; Fr: Amarante, Rouge amarante; Gr: Amarantos. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**AMEL/O** Materio.

Blanka substanco, ekstraktata el greno, semoj aŭ terpomoj, kaj uzata por nutri, glui kaj rigidigi tolaĵon.

**AMERIKTEREBINT/O** Suspensiaĵo.

Ĝi estas etera, balzameca solvilo kaj malviskozilo. Originas el diversaj amerikaj ŝtatoj. Estas balzameca oleorezino, elŝvitaĵo el diversaj koniferoj.

**AMETIST/O** Materio.

Ĉefe SiO<sub>2</sub>. Violkolora variaĵo de kvarco, uzata kiel ornamaĵo.

**AMETISTVIOL/A** Kolornuanco.

19Ĉ07. PURPURVIOLA-GRIZETA-KOLORETA. An: Amethyst violet; Fi: Ametistinvioletti; Fr: Améthyste de couleur; Gr: Amethystos; Sv: Ametistviolett. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**AMFITEATR/O** Kulturo.

Granda teatro sen tegmento, kun ŝtuparaj sid-

lokoj en rondo.

**AMFORFORMA VAZ/O** Tipo.  
**PRAHISTORIA**

Kp: Amforo helena, ma\*, sl\* k te\*.

**AMFOR/O HELENA** Tipo.

Duansa, mallarĝakola, kunpieda elargila vazo por konservi grenon, oleon kaj vinon, krome kiel premio kaj mezurilo de 26,2 litroj. Oftece surhavis pentritajn bildojn pri homoj, ornamaĵoj ktp. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AMPELOPSA FIGUR/O** Strukturo.  
**SILUETA**

Studado de siluetoj donas ideojn por fari dekoraciojn kaj ornamaĵojn, krome pli akran vidon por kapti konturojn de movaj objektoj. Pere de la figuroj oni intencas trovi la plej karakterizajn strek-, surfac- kaj masefektojn kun detalaj konturoj.

**ANAGLIF/O** Faraĵo.

Malalta reliefo, bareliefe skulptita aŭ ĉizita ornamaĵo sur sarkofako, vazo ks.

**ANALIZA KUB/ISMO** Artoskolo.

En pentro- kaj skulptoarto, kiu ne celas bildigi naturisme, sed pere de geometriaj kaj stereotipaj figuroj abstrakte. Ĝi reduktas la formojn kiel la certaj figuroj geometriaj. Estas malo al impresionismo kaj ekspresionismo. Ĝin karakterizas mozaikeco. Aktualas de la 1910. Kp: af\*.

-/ISTO Ano. -/AĴO Artaĵo.

**ANGLIRUĜ/O** Farbmaterio.

15D09. Normfarbo. Eblas miksi kun Kro, Ka, Pb, Pm, Zi. An: English red; Fi: Englanninpunainen; Fr: Rouge d'Angleterre; Ge: Englischrot; Sv: Engelskt rött. Vidu paĝojn 6 k 7. Kp: farbo. Oni konas ekde la 15. jc. Ĝi bezonas 70% da oleo. Estas sufiĉe sekiĝema.

-/A Kolornuanco.

**ANGLIRUĜ/O** Farbo.

Fe<sub>2</sub>O<sub>3</sub> .15D09. [Crocus Martis] La aliaj eblaj nomoj: BERLIN-, HINDI-, ITALI-, PERSI-,

POMPEJ-, PRUSI- kaj VENECIRUĜO. Laŭ la krudaĵoj ekzistas tri specoj: 1) Ferminio-grupo el kaj hematito kaj ferglimo 2) Vera angliruĝo el rubaĵoj de pretigo de kaj fero kaj kupro 3) Mortkapo-grupo el pretigo de sulfata acido. Preskaŭ ĉiuj suspensiaĵoj konvenas. An: English red, Indian red, Light red, Venetian red; Fi: Berliinpunainen, Englanninpunainen, Intianpunainen, Italianpunainen, Persianpunainen, Pompeijinpunainen, Preussinpunainen, Venetsianpunainen; Fr: Rouge anglais, Rouge indien, Rouge de Venise; Ge: Eisenoxyd, Englischrot; It: Rosso inglese, Rosso ossido; Sv: Engelskt rött, Indiskt rött, Persiskt rött, Venetianskt rött. Komparu kun: Angliruĝo farbmateriala. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ANGLIVIOL/O** Farbo.

Alia ebla nomo: VENECIVIOLO. La pulvoron oni bruligas ĝis ardo. An: Venetian violet; Fi: Englanninvioletti; Sv: Engelsktviolett. V. p-ojn 6 k 7.

Kp: fm\*.

**ANGULA FOLDOĈIZIL/O** Ilo.

Laborilo por skulptado.

**ANGULGUĜ/O** Ilo.

Laborilo por grafikado kaj skulptado.

**ANGULSEĜ/O** Tipo.

Kutima skribseĝo en mezo de la 18. jc-oj. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ANILIN/O** Farbmateriale.

An: Anilin; Fi: Aniliini. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fb\*.

**ANILINFARB/O** Farbo.

Sintezaj organikaj farboj, kiujn oni uzas kiel por farbokraĵoj, presfarboj kaj tinkturado. La farboj estas fortefikaj kaj klaraj, sed ne rezistemaj. An: Alizarin; Fi: Alitsariini. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Lazurbluo. Kp: fm\*.

**ANILINBLU/O** Farbmateriale.

$C_{20}H_{16}(C_6H_5)_3N_3$  Kp: fb\*.

**ANILINFLAV/O** Farbmateriale.

$C_6H_5N=NC_6H_4NH_2$  Kp: fb\*.

**ANILINONIGR/O** Farbmateriale.

Ĝ00 Kp: fb\*.

**ANILINRUĜ/O** Farbmateriale.

$C_{20}H_{19}N_3 \cdot HCl$  Kp: fb\*.

**ANILINVERD/O** Farbmateriale.

$C_6H_5 \cdot CHO$  Kp: fb\*.

**ANILINVIOL/O** Farbmateriale.

Kp: fb\*.

**ANIMALNIGR/O** Farbmateriale.

Ĝ00 a.k.l.o.s.v. Norma farbmateriale. La pulvoron oni fabrikas el karbonigitaj ostoj. Eb- las miksi kun Ci, Fe, Ka, Kf, Kr, Kro, Li, Mb, Mv, Pb, Pm, Pr, Ul, Zi, Zs. An: Bone black; Fi: Luumusta; Fr: Noir d'os, Noir animal; Ge: Beinschwarz; It: Nero d'osso; Sv: Bensvart. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fb\*.

**ANIMALNIGR/O** Farbo.

$13\frac{1}{2}\hat{G}02$ . Oni fabrikas ĝin el ostoj, karbige kaj muele. An: Bone black; Fi: Luumusta; Fr: Noir d'os; Ge: Beinschwarz; It: Neró d'osso; Sv: Bensvart. V. p-ojn 6 k 7. Komparu kun: Animalnigro farbmateriale. Kp: fm\*.

**ANSHAVA KRUĈ/O PRAHISTORIA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ANTAŬHELEN/O** Kulturo.

-/A Ekzistinta antaŭ la 5. jc. a.K. kaj influanta la helenan floradon.

**ANTAŬHISTORI/O** Kulturo.

Parto de la arkeologio, kiu studas la pratempon, pri kiu ni havas neniajn skribajn dokumentojn.

**ANTAŬKELT/O** Kulturo.

-/A Ekzistinta antaŭ la invado de la keltoj.

**ANTEFIKS/O ANTIKVA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ANTIKV/O** Kulturo.

-/A Ia ekzistinta kaj de longe ne plu ekzistanta. Tro malnova, malmoderna. -/ECA Imitaĵo de antikvepokaj stilformoj. -/ECO Eco de tio, kio estas antikva. Vidu: Brita imitaĵo antikveca ti\* k Brita ornamaĵo antikveca ti\*.

**ANTIKNVOVITR/O** Materio.

Imitaĵo de malmoderna vitro, kiu estas manlaborita kun projoj kaj malglataĵoj.

**ANTIMONTRIOKSID/O** Farbmaterio.

$Sb_2O_3 + BaO_4 + ZnO$  . A00. a.k.l.o.s.v. x Eblas miksi kun Ci, Fe, Kf, Kr, Kro, Li, Pb, Pm, Pr, Ol, Zi, Zs. Fi: Antimonitrioksidi, Timonoksvalkoinen. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fb\*.

**ANTVERPENBLU/O** Farbo.

An: Antwerp blue; Fi: Antverpeninsininen. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Prusbluo. Kp: fm\*.

**ARABGUM/O** Suspensiaĵo.

Ĝi solveblas en malvarman akvon, el kiu oni fabrikas papergluilon kaj suspensiaĵon kun akvo por akvofarboj. Ĝin oni ricevas el ŝelo de afrika akaciarbo. Nune ĝin substituas dekstrino, kiu estas hidroliza produkto de amelo.

**ARANĜITAĴA SKEM/O** Strukturo.

**ARBA BAZ/O** Strukturo.

Oni vidu kiel gravaj kaj karakterizaj estas la bazo, radikaro kaj branĉoj ĉe la arbotrunko por koni la strukturon de diverstipaj arboj .

**ARBA BRANĈAR/O SKEMA** Strukturo.

Vidu: Nuda foliarbo silueta st\*.

**ARBOSUKVERD/O** Farbo.

An: Sap green; Fi: Mahlanvihreä. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fb\*.

**ARĈA FIBOL/O PRAHISTORIA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARDRUĜ/O** Farbo.

An: Flame red; Fi: Hehkuvanpunainen, Tulipunainen. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**ARGIL/O** Materio.

$(OH)_4Al_2Si_2O_5$  . Formebla, tre etgrajna tero, uzata por skulptado kaj kiel materialo por brikoj kaj vazoj.

**ARGILA HIDOR/O HELENA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Grandventra, malaltakola akvovazo el argilo, kiu havas du horizontalajn kaj unu vertikalan anson. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILA KELEB/O HELENA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Grandeta vazo el argilo, kiu havas larĝan buŝon kaj malaltan, larĝan kolon. Rektaj, vertikalaj ansoj situas ambaŭflanke. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILA KOLBOTEL/O PRAHISTORIA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Botelo el argilo. La kolon ĉirkaŭas dikaĵo por nodi la portlaĉon. Ĝi originas el norda kulturo de la pli juna stonepoko. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILA LUTROFOR/O HELENA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Granda, alta duansa akvujo el argilo. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILA ORNAMAĴ/O EGIPTA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILA PSIKTER/O HELENA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Grandeta vazo el argilo por malvarmigi vinon en kratero, kiun oni metas en la psikteron. Psiktero havas duoblan parieton, kaj interne de la parieto oni metas la malvarmigan akvon. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILA STAMN/O HELENA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILA VAZ/O ROMANIKA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Kp: ma\*, sl\* kaj te\*.

**ARGILA VAZ/O MINOA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Ilin oni faris bonege, la parietoj estas ege maldikaj, kiel en ĉina porcelano. La eksteran surfacon oni tegis per nigra, brila farbo, sur kiu oni pentris terfarbe diverskolorajn, best-, mar- kaj plantbildojn. Ĝi originas ĉ. el la 20. kaj 19. jc-oj a.K. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARGILSKULPT/ARTO** Artfako.

La nomo laŭ la materialo. En ĝi oni formas figurojn el argilo aŭ tranĉante, aŭ knedante, aŭ skrapante. Vidu: Argilskulpturo. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**ARGILSKULPT/URO** Artfako.

La nomo laŭ la materialo. En ĝi oni formas figurojn el argilo aŭ tranĉante, aŭ knedante, aŭ skrapante. Vidu: Argilskulptarto. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**ARGILUJ/O** Ilo.

Laborilo por grafikfarado.

**ARĜENT/O** Materio.

Ag, atomnumero 47, atompezo 107,88. Blanka, valora metalo, uzata por moneroj kaj brilaĵoj. Ne oksidiĝanta en la aero.

**ARĜENTOGRIZ/A** Kolornuanco.

13E01. ORANĜAFLAVA-GRIZEGA- IOM KOLORETA. An: Old silver, Silver gray; Fi: Hopeanharmaa; Fr: Gris argenté; Sv: Silvergrå. V. p-ojn 6 k 7.

Kp: kl\*.

Ilo.

**ARĜENTODRAT/O**  
Laborilo por orajisto kaj arĝentaĵisto.

**ARIBAL/O HELENA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARKAIKART/O** Eco.

Pratempa arto; precipe skulptarto en Grekio en la jaroj 700 ... 480 a.K.

**ARKAIKECA** Artoskolo.  
**NOVKLASIK/ISMO**

Skolo en literaturo kaj arto, kiu imitas kaj observas la plej malnovajn formojn de la kvalitoj de la greklatinaj kulturaĵoj. Kp: af\*.

-/ISTO Ano. -/AĴO Artaĵo.

**ARKAISM/O** Tipo.

Intenca imitado de malnova verkomaniero aŭ stilo en arto de pliposta epoko. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARKITEKT/URO** Artfako.

Ĝi estas arta stilo de konstruo, kaj organizo la spacon per konstruaĵoj, kiuj respondas al bezonoj de homoj. Kp: as\*.

-/O Praktikanto. -/URADO Ago. -/URAĴO Produkto.

**ARKITEKTEC/O** Eco.

Arta inklino uzi la formojn arkitektecajn.

**ARKITEKTOSKULPT/ARTO** Artfako.

Arto, kiu laŭ formo kaj enhavo estas aŭ ligita al la konstruaĵo aŭ parto de la arkitekturaĵo, kiu celas aŭ bildigi aŭ karakterizi la konstruaĵon. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**ARKITEKTURA TIMPAN/O** Tipo.

HELENA Helena timpano havas raporton de alto al larĝo 1:8...7. Romania timpano havas raporton de alto al larĝo 1:6...5. Kp: ma\*, sl\* kaj te\*.

**ARKITRAV/O HELENA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ARMATUR/O** Ilo.

Laborilo por skulptado.

**ARMATURFRAM/O** Ilo.

Laborilo por skulptado.

**ART/A** Eco.

Objekto aŭ ago kiun oni faris lerte.

**ARTARANĜIT/O**<sup>P</sup> Artfako.

En ĝi oni desegnas aŭ pentras pri belarte aranĝitaj objektoj, floroj, fruktoj ks. V.p: 6 Vidu: Muta naturo af\* k Mutnaturo af\*. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/AĴO** Produkto.

**ARTEFARIT/A** Eco.

Farita per homa arto kaj ne devenanta simple de la naturo. An: Artificial; Fi: Keinotekoinen; Fr: Artificiel; Sv: Artificiell.

**ARTFAK/O** af\*.

Tuto de la reguloj kaj procedoj, tradicie difinitaj por fari ion en iu aparta fako. BATIK/ARTO, CERAMIKART/O, FRESK/ARTO, KIN-ART/O, MARKETR/ARTO, MEBLART/O. -ISTO, -ADO, -AĴO, -VERKO.

**ARTINDUSTRI/O** Artfako.

Ĝi estas metio aŭ aparta aktiveco per kiu oni produktas, aŭ manlabore, aŭ fabrike, artecajn kaj belaspektajn bezonaĵojn, per transformado de krudaj materialoj. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/AĴO** Produkto.

**ARTINSTRU/O** Artfako.

En ĝi oni transdonas al iu metodajn sciojn kaj lertigojn pri belarto. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/ITULO** Produkto.

**ARTKOLEKT/O** Artfako.

Ĝi enhavas kolekton de belartobjektoj. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/O** Produkto.

**ARTLED/O** Artfako.

Ĝi estas substanco, kiu konsistas el diversaj materialoj prilaboritaj, por ricevi la aspekton kaj kelkajn ecojn de la ledo. Vidu: Ledarto. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/O** Produkto.

**ARTMANEKEN/O**<sup>P</sup> Artfako.

En ĝi svelta junulino surmetas kaj prezentas al la publiko la novajn kreaĵojn de la kudroarto kun artisma nivelo. Vidu: Manekento, Manekeno kaj Modelino. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/AĴO** Produkto.

**ARTOKRITIK/O** Artfako.

Ĝi enhavas senpartian juĝon pri belarta verko tiel, ke oni ekzamenas la bonajn kaj malbonajn ecojn de la verko. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/O** Produkto.

**ARTOSKOL/O** As\*.

Tuto de la disĉiploj de unu artisto kiun oni rigardas kiel la mastro; aro aŭ sinsekvo da homoj adeptoj de la sama doktrino, principo aŭ afero. ABSTRAKT/ISMO, BRUJT/ISMO, KLASIKART/ISMO, NONFIGUR/ ISMO, POPULART/ISMO, POSTMODERN/ ISMO. -ISMO, -ISTO, -AĴO, -VERKO.

xxx

**ARTPOZ/O** Artfako.

En ĝi oni prenas kaj konservas specialan teniĝon, por ke oni desegnu, fotu, pentru kaj skulptu belartaĵon. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/O** Produkto.

**ARTVERK/O** Artfako.

Ĝi estas belarta nova produkto de la spirito. Vidu: Verkarto. Kp: as\*.

**-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/O** Produkto.

**ASFALT/O** Farbmateriale.

Bitumenhava, malhelbrila, nigra bruna naturprodukto, kies purigaĵon oni uzas kiel farbon,

tiel maldika tavolo donas orbrunan efikon. Ne estas normalfarbo, solveblas kun oleo, trapenetas suprajn farbtavolojn, kaj ĉifas kaj fendigas. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fb\*.

**ASFALTOLITOGRAFIK/O** Artfako.

Sur preparita litografia ŝtono oni ŝmiras maldikan, ebenan tavolon da asfalto, kiun oni manlaboras per gravurnadlo, grifelo kaj dratbroso por malkovri blankajn lokojn. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**ASFALTOPENTR/O** Artfako.

Pentrotekniko, en kiu oni uzas asfalton kiel bruna farbo, precipe por unukolora pentrado kaj fonfarbo. Ĝi modis en la 18. kaj 19. jc:oj, sed jam ne estas praktikata pro la malbonaj postefikoj. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**ASIR/O** Kulturo.

Antikva lando, en la norda parto de Mezo-potamio. Vidu: Portalornamaĵo asiria ti\*.

-/IOLOGIO Scienco pri la antikvaj civilizoj en Mezopotamio.

**ASISTANTFIGUR/O** Tipo.

Flankpersono, kiun oni ne postulas la temo de la artaĵo. Kp: ma\*, sl\* k te\*

**ASPARGA FIGUR/O SILUETA** Strukturo.

Studado de siluetoj donas ideojn por fari dekoraciojn kaj ornamaĵojn, krome pli ak ran vidon por kapti konturojn de movaj objektoj. Pere de la figuroj oni intencas trovi la plej karakterizajn strek-, surfac- kaj masefektojn kun detalaj konturoj.

**ATELIER/O** Ilo.

Speciala ĉambro, kie laboras pentristoj, skulptistoj ks. Laborĉambro por artisto, siaj helpantoj kaj la lernantoj.

**ATELIERPENTR/O** Artfako.

Precipe ene de ateliero farita artlaboro, dis de

ekstere en la naturo farita. Ĝi modis kiel la sola maniero ĝis la jaro 1830. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**ATELIERPENTROTREST/O** Ilo.

Laborilo por pentrofarado.

**ATENE/O** Kulturo.

Kultura domo, kie artistoj, beletristoj aŭ sci enc-istoj prelegas.

**ATIKA ARGILAJ/O HELENA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ATIKA ARGILVAZ/O HELENA** Tipo.

La nomo laŭ la materialo. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ATIKA KOLONBAZ/O HELENA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ATIKA VAZ/O HELENA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**ATLANT/O HELENA** Tipo.

Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AŬRORARUĜ/A** Kolornuanco.

16B05. RUĜA-BLANKETA-MEZKOLORA. An: Aurora red, Aurora orange; Fi: Aamuruskonpunainen; Fr: Rouge aurore; La: Aurora; Sv: Morgonrodnad. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**AŬTA KONTUR/O LITERARA** Strukturo.

Por ekzerci vidon oni eblas imagi, ke la objekto konsistas el literoj.

**AŬTODIDAKT/O** Tipo.

Memlerninto, kiu instruis sin mem, sen la helpo de alia persono. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AŬTOMATART/ISMO** Artoskolo.

Laŭ kiu oni kreas la artverkon tute aŭtomate sen iu ajn kontrolo kaj konscia kunesto. Kp: af\*.



**-/ISTO** Ano. **-/AĴO** Artaĵo.

**AŬTOR/O** Kulturo.

Verkinto de libro aŭ belartaĵo.

**AVANTGARD/ISMO** Artoskolo.

En teatro kaj arto, kiel antaŭira en artesprimo kaj renovigo de la formoj, sen aspiro de favoro de la spektantaro. Kp: af\*.

**-/ISTO** Ano. **-/AĴO** Artaĵo.

**AVELBRANĈA FIGUR/O SILUETA** Strukturo.

Studado de siluetoj donas ideojn por fari dekoraciojn kaj ornamaĵojn, krome pli akran vidon por kapti konturojn de movaj objektoj. Pere de la figuroj oni intencas trovi la plej karakterizajn strek-, surfac- kaj masefektojn kun detalaj konturoj.

**AVELOLE/O** Suspensiaĵo.

Ĝi estas grasa, sekiĝema oleo. Ĝin oni utiligas nur en pentrofarboj de artistoj. Estas sekebla oleo el juglando. Juglando entenas eĉ ĝis 65% da oleo. Putras pli rapide ol linoleo.

**AVENTURIN/O** Materio.

Speco de kvarco, entenanta malgrandajn bri lajn pecetojn el glimo.

**AVENTURINLAK/O** Suspensiaĵo.

Bruna lako miksitaj kun fajna metalpulvoro de japanaj laklaboraĵoj. Ĝi havas metalecan brilon.

**AVENTURINVITR/O** Materio.

Kupro aŭ kuprduoksido enhava vitro, kiu havas metalecan brilon, uzata por brilaĵoj. Ĝin oni inventis en Italio en la 17. jc.

**AZ/O** Farbmaterio.

An: Azo; Fi: Atso. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fb\*.

**AZENDORSA ARK/O** Tipo.

La alia ebla nomo: KILFORMA ARKO. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**AZOFLAV/O HELA** Farbo.

An: Azo yellow light; Fi: Atsokeltainen vaalea. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**AZOFLAV/O MEZA** Farbo.

An: Azo yellow medium; Fi: Atsokeltainen keskisävy. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**AZOORANĜOFLAV/O** Farbo.

An: Azo yellow orange; Fi: Atso-oranssinkeltainen. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**AZUR/O** Farbo.

An: Azure; Fi: Atsuuri. Komparu kun: Lazurbluo farbmaterio kaj Lazurbluo el kupro. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**AZURKOBALT/O** Farbo.

An: Azure cobalt; Fi: Atsuurikoboltti. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**BABILON/O** Kulturo.

Ĉefurbo de Babilonio.

**-/IO** Antikva regno semida, proksimume res - ponda al la nuna Irako.

**BALANCOGRAJNIGIL/O** Ilo.

Laborilo por grafikado.

**BALDAKENA ŜRANK/O GOTIKA** Tipo.

La nomon donas la tegmentsimila supra parto (baldakeno) de la ŝranko. Historie balda keno estas dekorcela tegaĵo el ligno, metalo aŭ tolo super enirejo, fenestro, lito, trono ktp. En la okcidento ĝi aktualas en la 12. jc. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**BALENOLE/O** Suspensiaĵo.

Ĝi estas nesekebla oleo kaj ne konvenas por pentrofarboj de artistoj.

**BALUSTRADA FOTEL/O** Tipo.

La nomon donas la balustrado (aro da balustroj) de remburitaj brakapogiloj. Ĝi modis en la 1880. jardeko. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**BALZAM/O** Suspensiaĵo.

La aliaj eblaj nomoj: VENECIBALZAMO, VENECITURPENTINO. Balzamoj estas aŭ viskozaj aŭ neviskozaj kaj eterecaj. Ĝi entenas rezinon, benzoan aŭ cinaman acidon. Estas e-lŝvitaĵo el diversaj arboj kaj pere de la distilado oni produktas kaj turpenon kaj rezinon.

**BALZAMTEREBINT/O** Suspensiaĵo.

Ĝi estas distilprodukto el rezino.

**BAMBUFLAV/A** Kolornuanco.

13Ĉ05. ORANĜAFLAVA-GRIZETA- MEZ-KOLORA. [Bambusa arundinacea] An: Bamboo; Fi: Bambunkeltainen; Fr: Jaune bambou; La malaja: Bambu; Sv: Bambugult. V. p-ojn 6 kaj 7. Kp: kl\*.

**BAMBUPLEKTART/O** Artfako.

En ĝi oni celas al belartecaj bambuplektaĵoj. Ekzemple: diverstipaj belaspektaj korboj el bambuo. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**BAMBUPLEKTOSKULPT/ARTO** Artfako.

En ĝi oni faras diverstipajn belaspektajn figurojn. Ekzemple: diverstipaj bestfiguroj el bambuo. Vidu: Bambuplektoskulpturo. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**BAMBUPLEKTOSKULPT/URO** Artfako.

En ĝi oni faras diverstipajn belaspektajn fi gu-rojn. Ekzemple: diverstipaj bestfiguroj el bambuo. Vidu: Bambuplektoskulptarto.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/AĴO Produkto.

**BANANFLAV/A** Kolornuanco.

13B08. ORANĜAFLAVA-BLANKETA-KO-LOREGA. [Musa sapientum] An: Banana; Fi: Banaaninkeltainen; Fr: Jaune banane; Hi: Banana; Po: Banana; Sv: Banangult. V. p-ojn 6 k 7. Kp: kl\*.

**BARELIEF/O** Eco.

Skulpaĵo, kies figuroj malmulte elstaras el ebe -

na fono kaj estas iom platigitaj.

**BARITOBLANK/O** Farbmaterialo.

$BaSO_4$ . A00. a.k.l.s. Eblas miksi kun Ci, Fe, Ka, Kf, Kr, Kro, Li, Mb, Mv, Pb, Pm, Pr, Ul, Zi, Zs. An: Barium white; Fi: Permanenttivalkoinen, Raskassälpä; Fr: Blanc fixe; Ge: Barytweiss, Mineralweiss, Permanentweiss, Schwerspat; It: Bianco permanente, Spato ponderoso; Sv: Permanent vitt, Tungspat. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Blankfikso. Kp: fb\*.

**BARITOBLANK/O** Farbo.

A00. An: Permanent white; Fi: Permanenttivalkoinen, Raskassälpä; Fr: Blanc fixe; Ge: Barytweiss, Mineralweiss, Permanentweiss, Schwerspat; It: Bianco permanente, Spato ponderoso; Sv: Tungspat. V. p-ojn 6 k 7. Komparu kun: Baritoblanko fm\*. Kp: fm\*.

**BARITOBLANK/O POSTIĈA** Farbo.

A00.  $BaCO_3 + 2HCl = BaCl_2 + CO_2 + H_2O$ ,  $BaCl_2 + H_2SO_4 = BaSO_4 + 2HCl$ . Ĝin oni fabrikas kemie, kaj ĝi estas pli pura ol la vera, krome ilin diferencas la grandereco. An: Blanc fixe; Fi: Blanc fixe; Sv: Blanc fixe. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Baritoblanko farba kaj komparu kun la materiala. Kp: fm\*.

**BARITOF LAV/O** Farbo.

La aliaj eblaj nomoj: PERMANENTO-, UL-TRAMARFLAVO. akr, akv: ro\*\*\*d. An: Permanent yellow; Fi: Permanenttikeltainen, Baryttikeltainen; Fr: Jaune permanent; Ge: Permanentgelb; Hi: Amarillo permanente. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**BARITORANĜ/O** Farbo.

An: Permanent orange; Fi: Permanenttioranssi. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**BAROK/O** Kulturo.

Ĝi estas kontraŭa al la klasikaj idealoj, preferanta temojn kun granda, mistika aŭ erotika emoci-ŝargo, ŝatanta la malsobrajn ornamojn, celanta la kontraston kaj surprizefektojn, kiujn ĝi atingas en la skulpturo per prezento de patosaj pozoj, en beletro per uzado de troigaj stilfiguroj (hiperbolaj, antitezoj, pintumoj ktp). Ĝin karakterizas prefero por la kurbaj linioj kaj la malsimplaj ornamaĵoj.

**BAROKPERL/O** Objekto.

Ĝi estas deformita, nesimetria kaj similas guton, oni favoris ilin en la 17. jc. La nomo devenas de la portugala barroco.

**BAROKPUNT/O** Tipo.

Kutrita punto, kun ornamtemoj burĝonoj, fes-tonoj, floroj kaj folioj kiel relative grandaj kaj densaj ornamfiguroj. Kp: ma\*, sl\*k te\*.

**BATALPENTRAĴ/O** Tipo.

Ĝi temas pri surtera batalo, ne pri surmara. Kp: ma\*, sl\* k te\*.

**BATIK/ARTO** Artfako.

En ĝi oni formas desegnojn sur ŝtofo tiel, ke unue oni kovras per vakso la netinkturetajn partojn de ŝtofo kaj poste oni tinkturas ĝin malvarma. Tiel oni ripetas tiomfoje, kiom oni havu la kolorojn. La metodo originas el Javo, sed alvenas al Eŭropo ekde la 1817. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/O Produkto.

**BATIST/O** Materio.

Plej delikata tolo el lino.

**BAVARPORCELAN/O** Materio.

En Bavario fabrikata moderna porcelano.

**BAZ/O** Faraĵo.

Malsupra, portanta parto de objekto aŭ konstruaĵo. Tio, sur kio estas konstruita io spirita; la esenca principo, ĉefa deirpunkto. Substanco, kiu, kombiniĝante kun acido, naskas salon.

**BAZBLANK/O** Farbo.

An: Foundation white; Fi: Perusvalkoinen. V. p-ojn 6 k 7. Kp: fm\*.

**BELART/O** Kulturo.

Ĉiu el la artoj, kiuj celas la belon, kaj el kiuj oni tradicie kalkulas ses: arkitekturo, danco, muziko, pikturo, poezio kaj skulpturo.

**BELETR/O** Artfako.

Literaturo, kiu celas kaj plenumas pure belartisman vidpunkton. Kp: as\*.

-/ISTO Praktikanto. -/ADO Ago. -/O Produkto.

**BELGAMIR/O** Faraĵo.

Per florfiguroj ornamita silkoŝtofo, kiun oni faris en la mezo de la 19. jc. en Francio en Rouen.

**BELGIBLU/O** Farbo.

V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Prusbluo fm\*. Kp: fm\*.

**BENZEN/O** Suspensiaĵo.

Ĝin oni distilas el kaj ŝtonkarbo kaj lignito kaj ligno. Estas brulema kaj vaporigema, kaj pro tio oni uzas ĝin en ŝprucpentrado kiel solvilo de artefarita rezino.

**BENZIN/O** Suspensiaĵo.

Ĝi estas miksaĵo el pluraj nedifinitaj likvaj hidrokabidoj, ekstraktata preskaŭ nur el petrolo post distilado, kaj uzata kiel solvilo por ŝprucpentrado.

**BENZO/O** Suspensiaĵo.

Ĝi estas rezino kiun oni uzas en brandlako por pliigi la elastecon de la lako.

**BERIL/O** Materio.

$Be_3Al_2Si_6O_{18}$ . Siliciata mineralo, entenanta berilon kaj liveranta flavan, rozan aŭ bluetan gemon. Vidu: Smeraldo mt\*.

**BERLINBLU/O** Farbo.

An: Berlin blue; Fi: Berliininsininen; Sv: Berlinerblått. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Prusbluo fb\*. Kp: fm\*.

**BERLINBRUN/O** Farbo.

Fi: Berliinruskea; Sv: Berlinbrunt. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Prusbruno fm\*. Kp: fm\*.

**BERLINRUĜ/O** Farbo.

V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Angliruĝo fm\*. Kp: fm\*.

**BETON/O** Materio.

Malmola substanco, kiu estiĝas el miksaĵo de cemento kun ŝtonoj kaj sablo per reago de akvo, kaj en aero kaj en akvo.

**BETULBLANK/A P** Kolornuanco.

14B02. ORANĜA-BLANKETA-

KOLORETA.

An: Birch bark; Fi: Tuohenvalkoinen; Fr: Blanc écorce de bouleau; Sv: Nävervitt. V. p-ojn 6 k 7. Vidu: Betulselblanka kn\*. Kp: kl\*.

Kolornuanco.

**BETULGRIZA/Ĉ02.** OKSIDOFLAVA-

KOLORETA.

